
# *Prezidanteco de Kubo renkonti?as kun fakuloj kaj sciencistoj pri sanaj aferoj*




**Díaz-Canel renkonti?o kun fakuloj kaj sciencistoj. Foto: Studio Revolución**

Havano, nov 1 (RHK) Subgvide  de la prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, ?i-marde okazis la kutima kunveno de Fakuloj kaj Sciencistoj pri Sanaj aferoj, en la Palaco de la Revolucio, kies temo estis la Programo de Patrina kaj Infanzorgado en la Insulo, kaj proponoj, kiuj celas adapti ?in al la nunaj cirkonstancoj de la kuba socio.

Ie en Kubo, patrino varmigas sian novnaskitan filon. La bildo de kvieto kaj amo havas malanta? si ekscitan historion, kiu parolas pri niaj profesiuloj: la? atesto ofertita al tri raportistoj de doktoro pri scienco Danilo Nápoles Méndez - estro de la Nacia Grupo de Ginekologio kaj Obstetriko -, en tiu epizodo estis ?eno de sukcesoj, kiuj eblis nur pro admirinda kompetenteco.

La profesoro diris, ke, jam en la procezo de aku?o, la paciento suferis de alta sangopremo pro kiu ?i suferis korhalton. Estis tiam ke intensivisto komencis revivigajn manovrojn; kaj sen perdo de tempo, oni faris peracion por ?erpi la idon, kio celis faciligi la reanimadon de la patrino. Aliaj intervenoj sekvis por ?esigi sangadon, stabiligi parametrojn kaj revivigi la patrinon. Nur scio kaj a?daco ebligis feli?an rezulton.

Tiaj rakontoj ne estas unikaj kaj estas parto de pli granda celo, kiun la Doktoro pri Sciencoj komentis al la Gazetara Teamo de la Prezidanteco de la Respubliko: “Mi devas mencii la subtenon, kiun la fako de Obstetriko kaj Ginekologio havis en la prizorgado de grave malsanaj pacientoj kun  intensivaj terapioj en la lando, kiuj anka? faris tre grandan penon, meze de limigitaj rimedoj, por savi ?i tiujn virinojn.”

Lia cerbumado  okazis  marde posttagmeze, kiam fini?is  la kutima Renkonti?o de Fakuloj kaj Sciencistoj pri Sanaj aferoj  en la Palaco de la Revolucio, kies temo estis la Programo pri Patrina kaj Infana Prizorgado en la Insulo, kaj proponoj, kiuj  celas ?isdatigi ?in kaj moderigi ?in kun la nunaj cirkonstancoj de la socio.

Kiel raportite en la kunveno, Kubo registros infanmortecon je  7,5 por mil vivaj naski?oj en 2022, post kiam ?i estis 7,6 en 2021. ?is nun ?i-jare, tiu sentema indico staras je 7,3, kio signifas, ke mortis 55 infanoj malpliaj.

Kvankam ?i tiuj datumoj ankora? estas malproksime de tiuj atingitaj en aliaj jaroj, en kiuj la indico estis ?irka? kvar poentoj, evidenti?as eta plibonigo, post la efiko de la pandemio COVID-2019 kaj sub la efikoj de la stre?i?o de la usona blokado al la insulo.

Pro la graveco de la Programo analizita en la kunveno, prezidento Díaz-Canel parolis pri atento al la temo, ?isdatigo, kaj balda? okazigo de alia kunveno. "La tempo ne povas esti mal?parita ?i tie," diris la ?tatestro, surbaze de sia rezonado, ke "se ni bone prizorgas gravedulinojn nun", tio efikos al estontaj parametroj.

Pri atento al malalta naskopezo, pri malsame labori pri la kardinala afero de patrinaj hejmoj, pri diferenca atento al la temo de nutrado el ?iuj eblaj spacoj, pri la valoro de genetikaj studoj, pri gravedeco en adoleskeco, insistis la prezidento. Li  anka? parolis pri la edukado, kio tre gravas ene de familio, kiu, rilate la proponon ?isdatigi la Programon pri Prizorgado de Patrino kaj Infano, deklaris: "Sendube, laboro estis farita serioze."

Fonto: retejo de Prezidanteco

---

[https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/338095-prezidanteco-de-kubo-renkontigas-kun-fakuloj-kaj-sciencistoj-pri-sanaj-aferoj](https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/338095-prezidanteco-de-kubo-renkontigas-kun-fakuloj-kaj-sciencistoj-pri-sanaj-aferoj)

RADIO HABANA CUBA

# Radio Habana Cuba